

La Brita Esperantisto

Sept-Okt 1985



LIDIA

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

81/A Jaro, N-Ro 866

Septembro-Oktobro

Eldonas:

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £10.00 (£6.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn 'Esperanto News' kaj 'La Brita Esperantisto'. Abono nur al "La Brita Esperantisto" estas £5.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, 'intensive' kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

Form of Bequest

I give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

LIDIA

Lidia, the life of Lidia Zamenhof, daughter of Esperanto, by Wendy Heller, George Ronald, 46 High Street, Kidlington, Oxford, 1985. 312p. Bound edition £16.50, paperback £7.50.

Dr. Zamenhof's youngest child, Lidia, was thirteen years old when her father died in 1917. It was she who was to carry on his work and to devote her life to spreading Esperanto as a highly successful Cseh-method teacher, particularly in France and the USA, before being slaughtered in the death-camp at Treblinka in 1942.

I found this new book by Wendy Heller both fascinating and inspiring. Sad to confess, I previously had only the haziest idea of Lidia and her work, and there must be many other Esperantists, particularly those younger than myself, who don't really know very much about Esperanto in the important years between the wars and don't, of course, remember what life was like then. This book will certainly enlighten them.

Lidia was a convert to the Bahá'í faith, which embraces among other things the concept of a universal language, and she was also, both in practice and in theory, a feminist. She wrote, "Women must arise – they want to arise – they are arising! Not to bring down the men, not to rip from their hands the scepter of rule and capture for themselves the reins of the world . . . no one wants that, even the most fanatic feminist. All women want is equality!"

Like her father, Lidia had a fine mind and a modest but utterly courageous personality. During her last months in the Warsaw Ghetto – so ably dramatised by Julian Modest in his play *Ni vivos!* – she refused offers of help from Christians and Esperantists willing to arrange escape and shelter for her, on the grounds that she could not risk endangering their lives along with her own. I am glad to believe that she was sustained

by her deep religious faith. She was only thirty-eight when she perished.

Wendy Heller's Preface is also unusually interesting. For example: "I quickly realised that to do research about Lidia I would simply have to learn Esperanto. Although I had studied several other languages, I wasn't looking forward to the prospect of having to learn yet another language just in order to write a book. But I was surprised to find I could soon read Esperanto better than languages I had studied for years . . . I became impressed by the ideals underlying Esperanto as well as the tenacity of the language, now nearly a hundred years old, to endure – to withstand schism, war and persecution – to face the apathy and mockery of the general public, yet attract the praise of some of the most esteemed scientific, political, literary and religious figures of the age.

"Esperantists often praise the practical usefulness of the language as a neutral medium of international communication, but the real meaning of this did not impress itself on me until I found myself in need of a certain piece of information about Lidia which could only be provided by a certain person in Sweden. Swedish was not one of my languages, and my correspondent did not know English. But no matter; Esperanto gave us a bridge to communicate with one another. Time and again this occurred, and the instant collapse of the language barrier almost left an audible crash. Without Esperanto I would never have been able to communicate with many of the people, of various nationalities, whose reminiscences provided the information for this book".

I hope many people will be as stimulated as I have been by this eminently readable biography of a remarkable woman.

THE DLT Team Starts Work

The BSO Company of Utrecht in the Netherlands has started trials of a system of automatic translation from English through Esperanto to French and vice versa. The project is called DLT (Distributed Language Translation). Progress so far has been reported in UEA's journal *ESPERANTO* (December 1984 and June 1985).

The DLT project is entering a period of rapid growth and BSO intends investing 17 million guilders (£3,750,000 approx.), of which 7.6 million (£1,690,000 approx.) will be contributed by the Dutch Government.

Dr. Victor Sadler, former director of UEA's Head Office is now working full-time for the project, as specialist for English-Esperanto. Dr. Klaus Schubert (formerly a lecturer in linguistics at the University of Kiel) is working as the specialist for the IL (ie. the interlanguage of the DLT system, a more rigorously defined variant of Esperanto). Ian Fantom from Britain is working as computer programmer. Rudiger Eicholz from Canada and Dutchman Wim Jansen serve as external advisors on terminology.

According to the work-plan, by 1987 it ought to be possible to demonstrate a working trial system for translating technical texts from English to French. It is not too early to speak of a significant step forward thanks to Esperanto.

The DLT system is threatened in several ways, however:

1. **Rivalry.**

Work is being carried out on at least ten automatic translation systems in different countries. If one of them succeeds, DLT will lose out.

2. **Negative, but influential critics.**

For example, a well known Dutch com-

putational linguist, Dr. Hugo Brandt Corstius recently stated; "The DLT project is erroneous: Esperanto has no syntax, because, when the language was constructed, syntax did not exist. Esperanto also has no semantics, because it is always a second language". It matters less whether such criticisms are valid or not, than whether BSO will be able to respond with practical results in the years to come.

3. **A lack of Esperanto-speaking specialists.**

By choosing Esperanto as the "Backbone" of DLT, BSO linked its fate to the existence and growth in the Esperanto movement of a whole army of trained linguists, translators and lexicographers. For each language DLT translates into and from, specialists are needed with a perfect mastery of that language and Esperanto. It was difficult to recruit a suitable candidate for Esperanto-French. In three years time the project will need four Esperanto-French lexicographers and the same is true for Esperanto-English. A lack of sufficient and suitable candidates could put an end to the whole project!

Because of the large sums of money invested in it, the DLT team is under great pressure to produce visible results and demonstrate convincing progress within a fixed time limit.

It ought to be stressed that BSO considers itself simply a user of Esperanto and not as a propagandist for the language. Although BSO has no interest in the Esperanto movement as such, some of its work will have positive advantages for the movement.

(Adapted by Hilary Chapman from an article by Toon Witkam in 'Esperanto', June 1985).

Thomas Hood:
MALFIDELA NELLIE GRAY

Ben Battle estis militist'
Sed diris post milit':
"Ĉar glav' senigis min de krur',
Nur taŭgas por mi lit'".

Li diris, dum ni portis lin
Post fino de milit',
"Ho, nomu min ne plu soldat',
Mi estas jam soldit'".

Senkrura devis stari li,
Sed li fieris, "Ĉar
Miaj membroj estos lignaj
Kiel parlamentanar'."

Ben amis iun Nellie Gray.
Ŝi lin gastigis ĉe si.
Li iris renkonti ŝin
Kiam drinko devis ĉesi.

Sed malestime diris ŝi:
"Ne povas plu vi min am-uzi,
Ĉar duonviro, kia vi,
Jam servas simple por amuzi".

"Ŝtonmalmolkora Nellie Gray",
Li diris, "vi pro l' am'
Promesis vin – ĉu temas nun
Rifuzi min pro lam'?"

"Min foje logis", diris ŝi,
"Ĉe vi l' amebraj kruroj.
Sed viron mi ne amas plu
Kun nur la meblaj kruroj!

"Soldaton enamiĝis mi
Dum tempo de junaĝ',
Sed kvankam brava estas vi
Forpasis la kur-aĝ'".

"Ho Nellie Gray, ho Nellie Gray,
Ne moku! En batal' mi
Vundiĝis pro la patroland' –
Ho, kia jen bat' al mi!"

"Do", diris ŝi, kripliĝis vi
Luktante tiel arme,
Sed malbonvena estas jam
Ruktanta tie larme!"

"Ho amortrompa Nellie Gray!
Mi certas, ke Nell amas
Alian viron tute nun:
Sendube li ne lamas.

"Ho Nellie Gray, ho Nellie Gray,
Mi konvinkiĝis, ke
En estonteco ne lig' re –
Alkroĉos Nellie Gray".

Kaj diris Battle kun amar':
"La viv' dependas nur
De ŝi. Finiĝu mia viv'
Jam nun de penda ŝnur'!"

Li kolon ligis al plafon'
Ĉar brogis ŝia vort'.
"Ŝi nomis min jam nur viron',
Ne viron trafas mort'".

Arbidajn krurojn prenis Ben
Kaj ĵetis al la ter',
Kaj kvankam nun senkruris li,
Li dancis en aer'.

La gorgon stringis nun la ŝnur' –
Ne ĝenu vin la leg':
Ne sola mortis povra Ben,
Sed ankaŭ kun kol-eg'.

Pro sinmortigo, l' enteriĝ'
Senpastris laŭ konven',
Sed malgraŭ manko de la preĝ'
Ne restis ĉerk' sen Ben'.

El la angla: Rik Dalton

PREMI-JO!

Iom surprizite, via Redaktoro ricevis (antaŭ la – ne menciita – limdato) eĉ kvin listojn de vortoj en la pasinta numero, kiuj finiĝis per -jo. Tio instruos al li ne fari stultajn spritaĵojn . . .

Montriĝis, ke enestis 16 diversaj vortoj tiaj, uzitaj sume 30-foje. Kvankam ne ĉiuj listoj inkluzivis ĉiujn el ili, la redaktoro decidis premii per libro ĉiujn kvin, por esprimi sian dankemon al tiuj diligentaj legintoj, kiuj evidente legis ĉiun vorton de la koncerna numero. Tia legantaro vere kuraĝigas lin.

Libroj estas do senditaj al: J. G. Foster, Prof. G. H. F. De Goja, Arthur Jackson, Sandra Slade, Marjorie White.

LAŬ MIA OPINIO . . .

Moŝtaj salutoj

En la antaŭ lasta *Brita Esperantisto* oni presas salutajn leterojn de S-ino Thatcher kaj Princo Charles al la Esperanto Kongreso. Ŝajnas ke nun estas modo eltiri tiajn banalaĵojn el famaj personoj kaj pretendi ke ili favoras la internacian lingvon.

Laŭ mi, ni devas konstati ke ili ne interesiĝas pri esperanto, (kaj S-ino Thatcher certe estas kontraŭ ĝi). Tiuj homoj simple sendas ĝentilan respondon al peto.

Emfazante la “aprobon” de gravuloj, ni emas ignori la pli imponan argumenton por nia lingvo. Tio estas ke homoj el ĉiuj mondpartoj vere uzas ĝin por komuniki – fakto multe pli grava ol vortoj de la plej eminentaj moŝtuloj.

Ian Wiberley

Demokratio

En sia ŝerce serioza letero (B E 864 p.45) Ivo Lapenna konsilis ke oni distingu inter demokratio kaj totalismo. Sed estas malfacile. Preskaŭ ĉiu registaro sin nomas “demokrata” – ĉu temas pri unu-partia ŝtato, aŭ pri nur bagatele kverelantaj partioj.

La du anglaj partioj grave disputas pri miksaĵo de eble 60/40 aŭ 40/60% de privat- kaj ŝtatkapitalismo. En la orientaj landoj la miksaĵo estas malpli egala (10/90 el cento?) Tie nuntempe tamen la proporcio vere ŝanĝiĝas. El tiaj partioj, mi neŭtrale subtenas nenion.

Ŝajnas al mi, ke estas tutmonda sistemo kiu prenas riĉaĵon de ne-riĉuloj, donante ĝin al la riĉuloj: Kreante la du kategoriojn de homo. Sed mi kredas ke la socia sistemo nature evoluis, do mi ne serĉas kulpanton, nur komprenon.

Leo McDonald

Short but not risible

I should like on behalf of many esperantists to thank Jim McDonald for his thought-provoking article relating to the Bookmark programme on TV dealing with Esperanto.

Those taking part were articulate exponents of Esperanto, as he rightly says, many of them steeped in it. As a result their evaluation of the programme would be very different from the masses who watched it on TV. For this reason we welcome Jim McDonald’s viewpoint.

Let us remember for future programmes that the “Esperanto illiterate” needs aids to help him get some understanding of the language itself, otherwise “he is hopelessly lost”. We must not presuppose that the masses know anything of the origin, ideals, basic structure of the language leading to the present-day successes.

Esperantists certainly would disagree on the point made by Jim McDonald that Esperanto suffers from having no geographical location – far from it. Esperanto has its location – the whole world. One only has to attend a world Esperanto congress to realise the benefits of not being restricted to one geographical location – everyone is on an equal footing.

As regards Esperanto being artificial and contrived – may I remind Jim McDonald that no language grew out of nothing. In a sense all languages are artificial and contrived in their “youth”. We tend to forget this when we think of languages like French, German, English, etc. because these languages have been running for a very long time. Give Esperanto a chance – we are still very young – only 100 years and we’ve come a long way – 12 million speakers, a formidable literature, strong ideals as well as a practical outlook.

Thanks again, Jim.

Phyllis Goodheir

Ĉiutaga Esperanto

SPIONA RETO – BLAGA
KONVERSACIO

“Kion vi legas, kara?”

“Libron”.

“Evidente, idioto! Pri kio?”

“*Spionoj en Efektivo kaj Fikcio*”

“Hm! Ĉu ĝi traktas *inajn* spionojn?”

“Kompreneble! Ĉiu spiona reto enhavu almenaŭ unu belulinon por delogi (*seduce*) la opozicion”.

“Ha! Vi nutras vian falokratan (*male chauvinist*) fantazion. Plej kredeble la spioninoj estis nebelaj (*plain*), se nur por ne tiri al si la atenton de la malamikaj viroj. Kiam mi estis lerneano, mi legis ie, ke la plej bona spiono estis maljunulino, kiu precipe mastrumis (*did the housework*), sed ankaŭ portis mesaĝojn kaj ĝenerale informadis la reton pri novaĵoj”.

“Tio estas malaktuala (*out of date*). Nuntempe reto de spionoj estas tre kompleksa. Laŭ mia libro la spionoj laboras en ĉeloj (*cells*), kaj, escepte de la ĉefo, neniu scias por kiu li laboras. Do, se la Kontraŭspiona Servo kaptas la spionon, li povas nenion malkaŝi”.

“Ĉu vi kredas, ke *mi* povus delogi alilandan spionon, kaj paroligi lin pri liaj sekretoj?”

“Tute ne!”

“Vi diablaĉo! Kial ne? Ĉu mi ne estas sufiĉe bela?”

“Ho jes! Sed ne sufiĉe inteligenta!”

“Ne inteligenta, ĉu? Mi pli bone abiturientis (*got better A-levels*) ol vi. Ne sufiĉe inteligenta? Ba (*rubbish*)!”

“Do, inteligenta vi estas, sed kion vi studis? La anglan lingvon, la anglan literaturon, kaj mastruman sciencon (*domestic science*). La moderna spiono devas scii multon pri elektroniko, pri kemio kaj pri lingvoj”.

“Mi povus lerni”.

“Ha jes! Sed je kioma kosto al la Fisko (*Treasury*)? Tio venus el niaj impostoj. Mi, aliflanke, estas kvalifikita majstro de

maskovestoj (*disguises*)”.

“Majstro? Vi? Ĉar dutrifoj vi aktoris en amatoraj teatraĵoj, kaj mem vin ŝminkis (*did your own make-up*)? Teatra ŝminko ne maskus vin en reala situacio”.

“Ne, ne! Mi ne ŝminkus min. Mi simple maskus min kiel ordinarulon”.

“Sed vi vere estas ordinarulo”.

“Kruele!”

“Eble ni povus esti para teamo”.

“Kiel?”

“Mi povus delogi la opozicion, kaj vi povus . . . elektroniki (*do something electronic*).

“*Elektroniki*? La vorto ne ekzistas!”

“Ĝi ekzistas nun”.

“Se Zamenhof aŭdus tion, li malripozus en la tombo (*turn in his grave*)”.

“Ĉu vi ĵaluzus, se mi delogus belan alilandanon?”

“Nu . . . ĵus venis en mian kapon, ke esperantistino ne rajtus esti spiono. Tio kontraŭis la spiriton de la movado”.

“Ne ĉikanu (*nit-pick*)! Kaj ĉu ne same por la viresperantistoj? Ankaŭ, vi ne respondis al mia demando”.

“Certe, mi ne ĵaluzus. Eble prosperus al mi delogatiĝi (*I might manage to get seduced*) fare de opozicia spionino”.

“Pro viaj ĉarmo kaj belo, ĉu?”

“Ne! Pro miaj informoj. Jen la avantaĝo de la scienco. Ĉu bela aŭ malbela, se oni havas esencajn (*vital*) informojn, oni estas ne nur deloginda, sed delogenda. Vere, mi povas imagi min ĉirkaŭata de belulinoj el pluraj nacioj, kaj ĉiu volas allogi min al si. Jes, kiam mi pripensas la aferon, mi ne povas kompreni kial mi ne ofertis min kiel spionon al la Ministro de la Milito (*War Office*) anstataŭ ol komizi en banko”.

“Vi bone scias kial. Vi preferas la sekurecon de la banko. Kaj vi nepre ne bezonas alilandan spioninon. Imagu, ke mi estas spionino alilanda. Nun, jen mi sur la sofo apud vi. Jen mi alpremiĝas (*snuggle up*). Jen mia vango ĉe la via. Mi instruos vin pri pli ol troviĝas en via stulta libro. Kaj neniu vin poste turnamente pridemandos (*interrogate*)!”

Don Lord

JUNA VETERANO

Esperanto-pioniroj, same kiel la maljunaj soldatoj en la Angla aforismo, ne mortas sed nur paliĝas en la memoro. Omaĝe al niaj forpasintaj pioniroj mi havas la plezuron prezenti bildon de Frank Westmancote pentrita de Reto Rossetti, okaze de la 80a naskiĝfesto de Frank, la 30an de Junio 1961.

Philip Willey

JUNA VETERANO

Reto Rossetti

Frank – ĉu estas vero, kara,
ke vi estas okdekjara?
Okdek jam? Nenial eble!
Vi ja ne aspektas feble,
sed fortike kaj robuste
kun plej juna kor' enbruste!
Kiel ĉarmas per la tono
Via voĉo de leono!
Jen la dorso, ĉiam rekta,
Jen la forto intelekta,
Jen – ridet' de peka bubo,
dum vi viglas en okupo
pri l'afero Esperanta
kun fervoro plej konstanta
jam dum pli ol kvindek jaroj
– sed kun pli ol kvindek haroj!
Al vi, granda laborulo,
ni alvenas kun gratulo.
Ho vi, juna veterano,
kresku ĉiam via sano!
Karaj – ni manprenu Frankon,
kaj nur diru: dankon, dankon!

PNEŬOJ BEZONATAJ

Juna pola esperantistino ĵus informis min, ke en julio ŝi ricevos uzitan sed pli konvenan rulseĝon fabrikitan en Anglio. Ĉar ĝiaj pneŭoj – neaĉetebblaj en Pollando – estas preskaŭ eluzitaj, ŝi singene demandis, ĉu ŝiaj britaj korespondantoj kaj mi povus helpi.

Jam de longe mi revas pri la sendo de rulseĝo elektra – sed mia financa situacio ne permesas, ke mi aĉetu eĉ la pneŭojn! Ĉu do mi rajtas peti, ke ne nur la korespondantoj de *Bernadeta Bujara*, sed

ankaŭ aliaj bonkoruloj aldonu modestan monsumon al mia kontribuajeto? Mi volonte entreprenos ĉion por ekspedi la pneŭojn kaj, se la sumo permesas, kelkajn aliajn aĵojn por faciligi la vivon de ĉi tiu esperantistino.

Ŝi neniam plendas; sed mi scias, ke dum la patrino laboras en najbara urbo, Bernadeta devas sidi en la propra ĉambro, ĝis ties reveno, eĉ ne povante tuŝi ion ajn ekster la atingodistanco.

Bonvolu sendi monon aŭ proponojn al:

Haku-mo'olelo-mehameha,
54A London Rd.,
Bexhill-on-Sea,
E. Sussex TN39 3LE.

Koran dankon!

NEKROLOGOJ

Forpasis la 10-an de Majo, 1985 S-ino Nancie **Durham**, post longa malsano, ano de EAB ekde 1980. Estinte emerita lingvo-instruistino, ŝi estis tre kapabla kaj energia laboranto por nia movado en multaj sferoj. Nancie laboris volontule en la oficejo por zorgi pri la administrado de korespondaj kursoj kaj ekzamenoj, ŝi dufoje organizis Esperanto-flugkaravanon internacian al Ĉinio, ŝi instruis nian lingvon diversmaniere kaj inkluzive de ĉe Britaj Kongresoj kaj en la Londona Esperanto-Klubo kaj estis valora soprano en la Londona Esperanto-Horo. Kondolencojn al ŝia edzo George kaj familianoj.

F. W. (Vilĉiĵo) **Hemens** mortis en junio 1985 je la 93-a jaraĝo en Totton, Southampton, Li komencis lerni Esperanton en 1958, post kiam li emeritiĝis kaj fariĝis fervora subtenanto de la lingvo. Li ofte kantis kaj deklamis en renkontiĝoj de la Grupo de Southampton kaj de la Suda Federacio. Nur dufoje li vojaĝis eksterlanden: al la U.K. de 1964 en Hago kaj al la franca Kongreso de 1965 en Havro. Ni kondolencas al lia filo kaj familianoj.

Adam **Harbottle**, Hexham, Northumberland, mortis la 29-an de Majo, 1985

dum sia 75-a jaro. S-ro Harbottle estis kviete agema en la Esperanto-Movado dum kelkaj jardekoj. Li estis ano de EAB, loka reprezentanto kaj UEA-delegito por Hexham.

Mortis je la 19a de Januaro 1985 S-ro J. **Ruksa**, London SE1, membro de la Asocio depost 1971.

La 3an de julio 1985 mortis Gerald C. **Jervis** en Luton. Gerald estis kuntradukinto de "Angla antologio 1000-1800" kaj verkinto de pluraj spritaj poemoj. Li tradukis la ŝekspiran "Mildigo de la Megero" kaj postlasis ankaŭ partan tradukon de "Kolegio de Klačoj" de Sheridan.

Mortis je la 19-a de Februaro, 1985 F-ino Rose V. Gregory, Paignton, Devon 88-jaraĝa kaj fidela ano de BEA/EAB dum 58 jaroj. Kondolencojn al ŝiaj geamikoj kaj parencoj.

NOVAJ LIBROJ

Parnasa gvidlibro. K. Kalocsay, G. Waringhien, R. Bernard. Tria eldono reviziita kaj kompletigita de G. Waringhien. 21 × 15 cm. 208 p. Edistudio 1984.

Kiu do ne konas la gajan blagon de la refreno "Ni donas ĉion, krom genio" el la invita balado, aŭ la facilan dancon de versoj en ĉapitro "La arto poetika"? –

Do – viajn versojn fajlu sen ripozo, ĝis ili fluos kiel bona prozo.

Per tia klara, senkomplika stilo en diafane komprenebla brilo aperos eĉ simbolo plej vuala.

Jen kiel sprite kaj verve debutis en 1932 nia Poetiko, certe superanta la rutinan paŝadon de multaj nacilingvaj analogoj, kaj nun ĝi reaperas en tria eldono esence sama, nur frizita en detaloj kaj aranĝo kaj ĝenerale portita en la hodiaŭon. Mi faris detalan komparon inter la tri eldonoj kaj – ĝin ĵetis en rubkeston. Por kio ja?

Esence la verko konsistas el 1. La elementoj de la metriko (skando, rimoj, harmonio, verspiedo, strofoj, fiksfarmaj poemoj); 2. La arto poetika: versa leciono glata, amuza kaj ĉie profitiga, kaj 3. Plena rimaro kun rimoj, rimoidoj

(aĵo – paŝo, cindro – vintro), agordoj (arbo – korbo, blinda – plenda), plus propraj nomoj kaj fakaj vortoj en vasta, klera ĉirkaŭbrako. Je la fino troviĝas glosaro – unue nomita "poezia fakvortaro" laŭ sofisma pretendo poste forlasita, kaj entute ia kurioza kolekto de vortoj jen iom uzitaj, jen ĵus proponitaj laŭ facilanima bontrovo de la aŭtoroj.

La tutan verkon trateksas aro da ekzempligaj citoj el poetoj ekde Zamenhof ĝis Nogueira.

La unua eldono bonhumore afiŝis sin "Kiel fariĝi poeto, aŭ Parnasa gvidlibro", sed la reeldonoj ĵetis la ĉarlata-nan ŝercon favore al la dua, ankoraŭ sprita titolo. Ĉar fakte la verko plej rekte utilas al tradukantoj de poezio, kaj rezulte ni jam havas en ĉiuj mondpartoj aron da kleraj literatoj, kiuj scias torni lertajn, sentoplenajn tradukojn de gravaj poemoj (Peer Gynt, Brand, La luzidoj, Martin Fierro, Kalevala) kaj ankaŭ verki mem okazajn poemojn por komplimento aŭ ludo, kiel similaj kulturtavoloj en la naciaj lingvoj.

Ĉe la vera poeto la formo venas el la inspiro, ne inverse, kaj niaj du plej spontanaj poetoj, Miĥalski kaj Baghy, kreis grandan diversion de formoj laŭ la varioj de temo kaj sento, iafoje irante de unu ritmo al alia dum la sama poemo. Eble pro tio ili estis nekapteblaj por K. kaj W., ĉar el Baghy ili prenis *unu* citon kaj el Miĥalski *nul*, kvankam li produktis eĉ kelkajn "maleblajn" daktilojn!

Ĉe la fiksfarmaj poemoj ni trovas kompreneble ankaŭ japaneskojn, sed ilin strange oni restis ĉe la termino "tankao" kvankam jam de 1971 Miyamoto mal-konsilis ĝin favore al *utao* – kun kroma formo la *longutao*. Kaj eĉ pli kurioze: por ekzemploj de utao kaj hajko oni donas nur kelkajn provoĵojn de okcidentaj fremduloj malgraŭ la riĉa rikolto mult-jara de Saburo Ito, Miyamoto masao kaj aliaj japanoj!

Tute simile, ĉe la angla limeriko oni prezentas du feblajn specimenojn de Schwartz kaj . . . GW?, anstataŭ sin turni al ni anglalingvanoj por kelkaj bone

irantaj ekzemploj.

Por lasta teknika rimarko mi atentigas, ke la “dektrioleto”: poemo el 13 tercinaĵoj estas, ne hazarda kapricio de la skotoj, sed io prenita el Giovanni Pascoli (dank’ al la tradukoj de Giordano Azzi) kiel poemformo eĉ pli efektiva ol la soneto. Ni naskis ja dekojn da ili!

Kaj permesu, ke mi indiku unu grandan blindan skvamon ĉe la aŭtoroj. Ofte kaj prave ili citas Zamenhof, sed ĉiam ignorante lian plej grandan poezian verkon (ekster la lingvo mem), nome la Proverbaron. En tiu ampleksa kaj sprita ĉefverko oni facile ja trovas ĉiujn ritmojn, rimojn kaj rimoidojn (se ne paroli pri du-tri licencoj) de la Parnasa gvidlibro. Sed eble ili tion lasis saĝe al iu studento por eventuala temo de doktoriĝa disertacio . . .

Kaj volonte mi estus vidinta ian trakton de onomatopoeo. Ĝi estas ja plezura trajto de multaj niaj poemoj: ĉe Baghy, Kalocsay, Hohlov, Maura, Miĥalski, Kurzens, Emba, Miyamoto . . .

Ni venas fine al la glosaro, tiu ludejo de diletantaj kapricoj. En la ŝanĝa elekto tra la tri eldonoj regas, neniel ia konstato pri uzado, sed nur ia kvazaŭ primadona temperamento, kiu prenas, ĵetas, ŝanĝas laŭ gusto de l’ momento. Ekzemple por *maldekstra*, I havas sinistra, II lifa kaj III liva (nur lifa estas uzita, de Francis); por *ungego* II havas grefo kaj III krifo; por *venĝa rebato* I diras represalo kaj II repirezaliao; por *malfermi* I havas aperti, II nenion kaj III *ovri* (kiun Pumpri kondamnis kiel tro similan al kovri); II kaj III havas por *kompleta laborvesto* kombineo, kvankam jam de 1928 (se ne pli frue) ni havas ĥalato, kaj poste ĉe Engholm supertuto. Sed subite en II kaj III salutas nin la “farniento” de Miĥalski (ĉu mi sufrolis?), kaj en III aperas *bagno* – ĉu el Metropoliteno? Nu, apud ĝi, kial ne registri “katorgo” (punlaborejo), kiu datiĝas de 1924! Sed tio jam portas min al mia lasta punkto, ĉar *katorgo* estas hapakso!

Jes, hapakso. Kiel longe mi sopiris tiun utiligan vorton, eĉ ne konsciante pri

tio. Ĉar subite Parnasa gvidlibro anoncas, ke hapakso estas “vorto unufoje trovebla en unu skribita lingvo”. Juuu! Jen fine mi havas skatolon, en kiu mi povos konservi aŭ sarkofagi diversajn karajn kuriozaĵojn. Ekzemple *narto* (glitveturilo tirata de hundoj) kaj *traco* (postsigno) ambaŭ el 1928 (Krasovskij), *obturato* de Miĥalski (1919), *ŝvaba* de Jean Forge (1923), *ĥleno* kaj *lavino* de Grabowski (1913 kaj 1903), *gaŭlo* de Hohlov (1928), *kacapo* (rusa kampulo) de Nekrasov, *maroto* ĉe Auld, eĉ *likopodio* de Zamenhof (1908)! Kaj ili ripozu en paco!

Sed tuj naskiĝas maltrankviliga penso. Ĉu ni ne bezonus ankaŭ terminon por la vortoj neniam eĉ unu fojon uzitaj? Kiel *lici*, kiu jam de 52 jaroj mucidas en diversaj vortaroj, dum ekster la pordo *darfi* pepas, jelpas, veas vane, kvankam uzata de Baghy, Koĥinek, Vondroušek kaj aliaj? Aŭ *lici* kaj *darfi* kunvivu, kiel ŝtormo/tempesto kaj strando/plaĝo.

Jen kiajn viglajn pensojn vekas ĉi tiu trezora libro. Mi eĉ konjektas pri tiu trajto ĉe la du aŭtoroj, kiun mi nomas la *modismo*. Ekzemple Kalocsay iam pensis pri *misa* por “malbona en ĉiuj sencoj”. Prefikse kaj memstare ĝi longe montris sin utila. Sed iun tagon li ekpensis pri *mava*, kaj *misa* tuj malaperis sensepure. Simile Waringhien en sia unua antaŭparolo al Parnasa gvidlibro skribis “tradukiĝis . . . La *Tragedio de l’ Homo* de Madáč age de Kalocsay” – kvarfoje li donis tiun “age de”. Sed en dua kaj tria eldonoj, repesante tiun antaŭparolon, li ŝanĝis *age de per far*. *Age de* fariĝis jam eksmoda. Sed ĉu necesis honti ĝin? Ĝi estas ja ankoraŭ tute bona, apud *fare de*. Sed eble denun *far* bezonas monopolon por entute sukcesi? Se jes, mi mem aŭ restos ĉe *fare de*, aŭ eble reiros al la volapuka *fa* . . .

Ĉar ankaŭ mi ŝatas la pitoreskon. Kaj ĉi tiu volumo – la plej grandformata kaj impona el la tri eldonoj – pompos sur miaj bretoj kiel valora ŝtupo por novaj taĉmentoj de poezi-adeptoj.

R. Rossetti

Johano la Brava, de Sándor Petöfi. Popolfabelo en versoj. Esperantigis Kalman Kalocsay. Kvara eldono, Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1984. 60 p.

Ĉi tiun eposon verkis la 22-jara Petöfi. Post plua kvarjara kolosa verkado, kiu levis lin al rango de la plej granda hungara poeto, li mortis sur la batalkampo.

La poemo legiĝas senpene. Ĉarme naiva, vikle okazoplena kun eĥoj el Perrault kaj el hungara folkloro (la Fabeloceano), ĝi rakontas pri juna ŝafisto kiu soldatiĝis, trafis inter rabistojn, poste renkontis kaj superruzis gigantojn ĝis fine li venis en Felandon por unuiĝi kun sia Ilno kaj regi la landon. La eventoj tiras nin antaŭen kaj je l'fino ni ne miras, ke ĉiuj hungaraj infanoj ĝin legas en lernejo kaj ĝi restas unike familiara inter la hungaroj entute. Kiel la poemoj de Burns por la skotoj, Bapto de Caro Vladimir por la ĉeĥoj.

Kalocsay tradukis ĝin en 1923 kaj 25 jarojn poste li tralaboris ĝin por dua eldono. Nun temas pri tiu versio kun aldono de unu strofo, kiu elglitis el la dua kaj tria eldonoj.

En 1948 mi eklegis la poluritan tradukon kaj konstatis, ke Kalocsay falis sub sian propran dogmon pri uzo de la artikolo kaj ĝin enportis ĉie, kie antaŭe ĝi ŝajnis nebezona. Li do ne komprenis, ke la uzo de la artikolo devas evolui, ne submetiĝi al aprioraj leĝoj. Kaj Johano la Brava de 1923 dokumentas la tiaman uzon. Dekreti de poste signifas falsi la historian materialon. Sed tempo kaj uzado valoras nenion por tiuj, kiuj ekzemple "korektas" ĉe reldono la verkojn de Kabe, igante lin diri, ne "morti de malsato", sed morti *pro* malsato, tiel, ke la faktan uzon de Kabe ni jam ne rajtas koni. Kaj same ĉe Kalocsay la logiko foje superbruis la lingvosenton kaj la tempa faktoro de apartaj vortuzoj malaperas. Nu, sub sia rigora kompreno pri "la" li rajtas ja fuŝi siajn antaŭajn belojn en ekz. (ĉe Petöfi) Monto kaj valo, Vesperigo, Malĝojo: ocean' giganta, se aliflanke li kapablis ĉe revizio

de La tragedio de l' Homo ĝin levi el bonega ĝis superba. Sed Johano la Brava estas pli delikata floro. Kaj la fruan tradukon oni devas pesi kun atenta orelo por ĝia simpla belo kaj epika fluo.

Ke la revizio donis multloke gajnon, atestas jena loko:

(1923)

Bluĉiel' nigriĝis pro la nuboj fuma

Kaj paliĝis vango de la lun' plenluma.
(1948)

La ĉielon puran nigra fum' vualis

Kaj de l' plena luno la vizaĝ' ekpalis.
Ke tamen povas okazi la malo, montras jena ekzemplo:

(1923)

"For de mi fripono, for de mia domo!"

Jene ŝprucis vortoj de l' furora homo.
(1948)

"Mi plu vin ne vidu! For de mia korto!"

Tiel el la mastro ŝprucis vort' post vorto.

La dua ĉerpo montras la oftan ŝanĝon de "jene" al "tiel": pli malvarma vorto kiu, kun same ofta ŝanĝo de *lia*, *ĝia* per "ties" lezas la intimecon de la rakonta stilo. Kaj kiel interese estas konstati, ke Kalocsay, kiel Baghy, uzis tiutempe furor-o, -a anstataŭ furioz-o -a! Nu, se ankaŭ Baghy reviziis siajn verkojn, ni tion eĉ ne scius.

Ankaŭ alirilite Kalocsay kamuflis pli fruajn tavolojn de sia lingvouzo. En 1923 li libere uzis "iri" en la baza senco "iri piede" (uzo troviĝanta ankaŭ en la angla "go", ekz. King Lear "Ride more than thou goest") sed ĉe revizio li pliparte ŝanĝis tion je "marŝi". Kaj kie la frua traduko glate diris "duonpatrino" kaj "patrinaĉo", la dua donas la novan kaj malpli belan "stifpatrino". Kaj iel strange, en la verso (pri fantomoj) "Ĉiuj malaperis laŭ la koka voko", li ŝanĝis "laŭ" al "per" anstataŭ al la ĝusta "ĉe", kiel en *Hamleto*: "Li malaperis ĉe la koka krio". (Fakte, Z. skribis "ankaŭ" ĉisence, sed neniam "per").

Genas en la revizio ankaŭ la ofta divido per ligstrekoj de la vortkunmetoj, kiujn la unua traduko donis sen-

breĉe: vilaĝ-fino, dolĉ-parole, flamo-langoj, kanto-sona . . . Tio impresas, kvazaŭ degna klarigo por infanetoj aŭ komencantoj, dum la origina traduko paŝis elaste sen tiaj interrompoj.

La manko de historia sento ĉe Kalocsay kaŭzas, ke li ne skrupulis, dum tralaboro de fruaj verkoj, propraj kaj fremdaj, enporti postajn neologismojn, kiel ĉi tie pita, lontana (ve, ke mi proponis ĝin al li!), langvora, morne – kaj “aperiti” de Grabowski, kiun li verŝajne ŝanĝis al la “ovri” de la ĵusa 3a eldono de Parnasa gvidlibro, se li hodiaŭ vivus! Kia risko ja, enporti neologismon, kiu povos velki al arkaismo kiel la “fakelo” de Kabe!

Nu eble oni taksos min poltrono, skermanta tiele kun fantomo, sed ankaŭ dum lia vivo mi ja plurfoje disputis amike kun Kalocsay pri lingvaj punktoj, ĉar kara estas Platono, sed la vero pli kara.

Mi do zorge komparis la du tradukojn kun poentoj plusaj kaj minusaj por la respektivaj ŝanĝoj. Kalocsay ja ŝanĝis en 114 lokoj kaj mi esperis solidan venkon por la plusoj. Kia ĉagreno do konstati, ke la fina kalkulo estis +188 kaj –226.

Estus tre bone, se iu alia farus saman eksperimenton kaj raportus la totalojn . .

R. Rossetti

Ne Nur Leteroj de Plum-Amikoj de Marjorie Boulton Eldona Societo Esperanto Malmö 1984 63p. broŝ.

Tro modeste D-ro Boulton diras, ke ŝi verkis ne por esperantistoj jam spertaj, sed por legantoj, kiuj scias ankoraŭ malmulton pri esperanto kaj pri ĝia literaturo. Ne nur komencantoj trovos ĝin utila. La Sveda Esperanto-Federacio petis, ke ŝi tion faru, por ke ili traduku ĝin en la svedan lingvon.

En naŭ ĉapitroj ŝi diskutas diversajn aspektojn de sia temo, aparte: la amplekso de nia literaturo, la problemoj de la verkisto, poezio, prozo fikcia kaj nefikcia, dramoj kaj tradukoj. Fine, ŝi gvidas la komencanton al utilaj legaĵoj.

Ĉu ŝi trafis sian verŝajne tro ambician celon? Mi kredas, ke jes. Evidente la literaturo de esperanto estas tro vasta por simpla libro vulgariga, sed nete ŝi traktas la aferon, kaj ĝenerale sin tenas al meza vojo inter nura listigado, kaj personaj preferoj kaj anekdotoj. Ĉu ĝuste ŝi taksas la valoron de Julio Baghy en la esperanta beletra mi ne kompetentas juĝi; tamen, miaopinie, en tia konciza verko ŝi donis al li misproportcian kvanton da spaco. (Oni povas nomi iun majstron per malmulte da frazoj).

La laboremo kaj sindediĉo de D-ro Boulton estas bone konataj. Evidente ĉiu ĉapitreto de la libro estas bazita sur longa esplorado kaj kritika analizado. Mia sola bedaŭreto estas, ke ŝi ne mencias “Dona Bárbara”, ne sole ĉar tiu traduko estas belega, sed ankaŭ ĉar ĝi estas modelo de la *hispanlingva* skolo de la tradukarto. Kaj ankaŭ . . . Sed, per libro poŝgranda oni ne povas plaĉi al ĉiu pri ĉio.

La verko ne estas plua sensuka traktado de la esperanta beletra. La voĉo de la verkisto – unika kaj persona – aŭdiĝas sur ĉiu paĝo. Bonŝancaj la svedoj – kaj ne nur ili.

Don Lord

La Robaioj de Umar Kajjam, el la persa originalo tradukis G. Waringhien. Dua eldono reviziita kaj plivastigita, 1984. Tk-Stafeto, Antverpeno. 107 paĝoj.

Cicerono (m.43 a.K.) neniam legis la *Eneidon* de Vergilio de ĉ.30 a.K.; do li neniam sciis, je kio lia latina lingvo estas kapabla. Tiun fakton mi apenaŭ povas enkaptigi al mi. Same Zamenhof, mortante 1917, neniam legis verkojn, kia *La infana raso*, do neniam sciis la tutan potencialon kaj tutan potencon de sia lingvo. Eble li mem ne estus povinta traduki la *Robaiojn*: li ne scipovis la persan kaj eble Esperanto ankoraŭ ne estis evoluinta sufiĉe por permesi la tradukon. Pasis 36 jaroj; jen la lingvo plene matura, kaj jen elpaŝas Esperantisto kapabla eluzi tiun maturecon kaj

fari tradukon, pri kiu la lingvo rajtas fieri (1953). La pruvon konfirmas 27 jarojn poste W. Auld per sia traduko de la angla parafrazo farita de E. Fitzgerald en 1859 (75 *robaioj*). Nun G. Waringhien prezentas al ni la revizion de sia unua eldono, ci-foje 211 *robaiojn* elektitajn el ses diversaj persaj manuskriptoj, inkl. tiun utiligitan de Fitzgerald.

Post interesa Antaŭparolo pri la genezo de la du eldonoj sekvas Enkonduko riĉa je ĉiaj informoj, pri la persa lingvo, la poeto-matematikisto (ĉ. 1040- ĉ. 1123), la verko (ĉu aŭtenta?), la penso (hedonismo plus skeptikismo), la poezio (ĉu Heine aŭ Voltaire?), la *robaio* (verskvaro el "longa silabo anakruza, sekvata de tri ĥorjamboj kc."), kaj la traduko (fidele el la persa).

Pri la penso, mi aldonu, ke la itala Mario Praz nomis Kajjam "la Lukrecio de la epoko viktoria" (kiam Fitzgerald verkis); sed laŭ mi Kajjam tute ne estis epikura figuro en la vera senco. Estas signife, ke Swinburne (m.1909) modelis sian *Laus Veneris* (Laŭdo de Venera) laŭ la Fitz'a verko). Nemenciita restas la traduko farita de Robert Graves en 1967, kiu celis montri, ke Kajjam estis Sufi'a mistikulo, kies verko estis komprenota nur de inicitoj; sed ĉar la supozata ms. estis netrovebla, temas verŝajne pri mistifikajo.

Pri la *robaio*, jen la granda merito de ĉi tiu redono: la natura flueco de la versoj; ĉiam (krom ĉe ekzotaĵoj, klarigitaj en la 111 notoj) perfekta klareco, sen tordita vortordo: ekz. *ĉar nur el malproksimo tamburo sonas dolĉe* (108/4), kaj la tutajn 125, 170, 174, 184. (Maloftaj versoj kiel 155/4). Ĉi tiu "esperanta aleksandro" konsistas el "du samaj hemistikoj de tri jamboj kaj kromsilabo" (p.29) modifita laŭbezone per la licencoj de *Parnasa Gvidlibro*. Ĉi tiuj certe evitigas la monotonecon; sed kiam enklitikaj vortoj ricevas akcenton (la t.n. *stumblo* aŭ *karambolo*, 33/4) aŭ kutime akcentataj vortoj perdas la akcenton (la t.n. *ŝvebo*, 9/1, 142/3), tiam eĉ la aŭtoro, laŭ 30/3, ne tro kontentiĝas, kaj por mi

tio estas kvazaŭ la 'falsa mezuro' de la latinaj vokaloj ĉe versa komponado. Aparte interrompas la fluecon fina duobla amfibrako (51/2, 69/3 kaj ceteraj ok). Foje rezultas silabo troa, t.e. 9½ anst. 8½ (142/3). Feliĉe, asonanco maloftas (ekz. 107, 117, 141, 171, 197), kaj la rimado (*aaba*, foje *aaaa*, ekz. 8, 43, 44, 45, 209) perfekte redonas la robaian kvarverson (PIV) aŭ versokvaron (p.27). Tridekfoje la rimvorto estas la sama, kiel ĉe 1 (kion Dante faris nur kun *Kristo*). Vira finaĵo okazas sesfoje en diversaj versoj.

Gramatike interesaj kaj utilontaj al poetoj estas: *tempete* (dum iom da tempo) 37/4, *sami* trans. 21/4, *glavi* trans. 41*1, *baldaŭi* ntr. 47/4, *lucerni* (brili, instrui) 91/2, disfadena (ĉifona 210/4, humeniĝo (polviĝo) 95/4, *turpo* (malvirto) 41/4, *sangvino* (-eco, optimismo, ne PIV 2) 51/2, *resprosi* (reflori) 87/4, *akro* (maldolĉo, severeco) 189/2, *baso* (humileco) 106/2. Apud la 24 Glosoj listigitaj metu la aŭdacajojn *ĉipa* kaj, kvankam en PIV, *liven* (ambaŭ en ekster-seriaj strofoj, p.25-26), *hiero* (hierao) 14/4, *viatiko* (kp.PIV) 43/1, *pretero* 132/4, -a kaj -o anstataŭ -ul(in)o 90/1, 133/4. Neologisma, ĉar ne-Fundamenta, ne-PG'a, kaj ne-PIV'a, estas la latinida uzo de la Kondicionalo de Supozo (noto 62). Dank' al Alaho, nur unufoje (170/4) ellaso de Subjektpronomo. Notu, ke ĉe p.25/8 *interpolis* signifas *koruptis per interpolaĵoj* (ĝuste laŭ PIV), do ne *enmetis*. Preseraroj nur du: legu *sola* (p.8/14), kaj *ĥorjambo* (p.28/6).

Ĉi tiun tradukon oni plej bone preskribos per la ofte pruntata franca laŭda parolturno: *tour de force!*

D. B. Gregor

Initiation Theorique et Pratique a La Langue Internationale Esperanto de Pol Denoël. 6^e édition. Sonorilo, Wilrijk, 1984. 96p. Prezo 250 belg. fr.

Ĉi tiu lernolibreto havas sufiĉe longan historion en Francujo. Ĝi aperis unue en 1934. La version reviziitan de 1959, kun

novaj legotekstoj kaj ekzercoj, bonvenigis Waringhien: "sub tre malvasta volumo ĝi prezentas tre klare . . . la kernon de nia lingvo" (*N.L.R.*, 1959-60). Sekvis aliaj eldonoj, el kiuj tiu ĉi lasta estas freŝe reviziita, kun suplementaj kaseto kaj ŝlosilo al la ekzercoj.

Ĉu ĝi utilos al anglaj komencantoj? Ne nur ĝi estas verkita en la franca, sed ankaŭ ĝi estis pripensita france: ĝi instruas ke oni prononcu *u* kiel la franca *ou*, kaj *ŝ* kiel la franca *ch*; oni renkontas baldaŭ la komplementon rektan kaj nerektan, kaj la modon imperativan-subjunktivan. Ĝi helpus eble al franca komencanto perdiĝinta en angla klubo.

Tamen, ĝi povus esti neatendite utila al anglaj instruistoj kiuj konas iomete la francan; ili povus trovi ene novajn ideojn kaj instrurimedojn, novaspecajn klarigojn kaj tekstojn ne antaŭe konatajn. Interesis min la tabelo de afiksoj klasitaj laŭ la ideo komunikata: tiel, estaĵo estas aŭ senanima aŭ anima; se anima, ĝi estas aŭ izolita, aŭ en familio, aŭ en socio; se en socio, ĝi estas -isto, -ano, -estro aŭ eks-; kaj tiel plu . . . Kaj kelkaj bildoj, tiel kiel "skribinta/anta/onta" kaj "Li razas lian vizaĝon/li razas sian vizaĝon/ili razas sian vizaĝon/ili razas sian vizaĝon reciproke" estas neforgesablaj.

Katelina Halo

La Islama Respubliko/Ekesto, esenco, konsekvencoj, de Philipp W. Fabry. Germana-Esperanto. Trad. Reinhard Hauptenthal. Eld. Artur E. Iltis Saarbrücken, 1984. 21cm. 35p. broŝ. Prezo £2.00 inkl.

La broŝuro estas dulingva eldono de prelego de d-ro Fabry, kiu travivis la revolucion en Irano kiel "okula atestanto", estante de 1975 ĝis 1983 estro de la Germana Lernejo en Teherano.

Li asertas pasie, ke eĉ klerulaj institutoj restas nesciaj pri la afero, kaj celas nin informi. Sendube, voĉo kiu ne laŭiras la ĝeneralan takson pri granda politika kaj socia revolucio, aparte kiam tiu okazas en la kadro de grava mon-

dreligio, estos utila por ĉiu Esperantisto, kiu deziras pensigi sin ekster la limoj de la propralanda vidpunkto.

D-ro Fabry insistas, ke sub la Ŝaho "ne kriis subpremata amaso de ekspluatatoj pro pano kaj libero", aldonante, ke "al la help-laboristo sufiĉis lia modesta salajro . . ." (!) Li agnoskas, ke "regis preskaŭ nekredebla korupto de la civilaj kaj militistaj elitoj, kaj ĝin, ĉu pro nescio, ĉu pro indiferento, ne sufiĉe oponis la Ŝaho". Fabry konis la Ŝahon, kaj do facile flankenŝovas tiajn aferojn, kiaj ekzemple tio: ĉu vere la Ŝaho estis nescia, aŭ ĉu li estis *indiferenta* pri la korupto universala. (Ke li mem estis korupta estis ĉiam unu el la akuzoj kontraŭ la Ŝaho). Post tiu tro facila formeto de kritiko, d-ro Fabry esploras iranajn perspektivojn kaj misajn vidpunktojn politikajn, kaj diskutas la rolon de pluraj mondgravaj landoj en la revolucio.

Mi havas nek historian nek geopolitikan sciojn sufiĉajn por taksu la tezojn de la prelego. Eble tio ne tre gravas, ĉar unu el la temoj de la preleginto estas, ke la eŭropaj landoj, Usono, kaj Sovetunio miskomprenis, kaj do misprezentis al si, la aferojn en Irano – ke eĉ la tielaborantaj funkciuloj de diversaj registaroj restis senciaj. Se tiu aserto estas prava, li donis al ni valoran perspektivon en la iranajn situacion sub "Ajatolo Khomeini". Mi trovis la prelegon stimula kaj interesa.

La ortografio de nomoj estas nekonsekvenca: *Prawda*, sed *Hruŝĉev*; *Shemira* sed *Ŝaho*; k.c. Mi dubas ĉu konsilinde estas diferencigi inter *kh* kaj *ĥ* en la Esperanta eldono, ĉar *kh* por ni certe ne indikas fonetike la persan originalon. Ankaŭ, utile estus havi en la Esperanta eldono klarigon pri la terminoj *pasdaro*, *akemenido* k.c. La nomo Hauptenthal garantias la kvaliton de la lingvaĵo.

Don Lord

Diablot' En Botel' de Robert Louis Stevenson, trad Ergoto de Bonaero. Buenos Aires 1983. 72p. Prezo £4.

La legendo de homo, kiu vendas sin al

la diablo kaj lastmomente estas savita, la temo de 'Fausto' de Goethe, ankaŭ inspiris unu el la pacifikaj noveloj de la skota verkisto R. L. Stevenson (angle 'The Bottle Imp'). Viro el Havajo aĉetas botelon kun diableto, kiu donas al li ĉion, kion li deziras, sed sub du kondiĉoj: li povas vendi ĝin nur malpli koste ol li aĉetis ĝin, kaj tiu, kiu mortos posedante ĝin, iros inferen. Eble la moralo de la rakonto estas, ke la moderna 'progreso' al potenco kaj distrado kondukas al mal-feliĉo, sed ĝi neniam estas altrudita.

Mi ne scias, kial la tradukinto kaŝis sin malantaŭ pseŭdonimo, ĉar lia traduko estas sufiĉe fidela kaj leginda. Malaprobindaj estas 'oftalmoj' anstataŭ 'okuloj' (plurfoje, do ne eraro) kaj 'Anglatero' anstataŭ 'Anglujo'. Malbonŝance ekzistas alia traduko, de la kanada Cynthia C. Vincent, eldonita en 1982, kaj kompare al ĝi la nova traduko ne tre bone impresas.

En tiu de Vincent la papero kaj liter-tipo estas bonaj; ĝi havas plaĉan kovrilon kaj ilustraĵojn; ĝi aperis en unu volumo kune kun alia Stevenson-traduko "Insulo de voĉoj" kaj kostas malpli, dum la libro de Ergoto estas kseropresita kaj en la sola ilustraĵo la diableto aspektas ridige, ne timige. Krome, komparante detalojn oni trovas, ke V. pli ofte trafas la sencon. Jen kelkaj ekzemploj: 'there is no reason why you should not' E p.9: 'ne estas kaŭzo, kiu povas malhelpi' V: ekzistas nenia kialo kial vi ne povas'. 'cried' E p.11: 'esprimis' V: 'kriis'. 'to be sure' E p.14: por esti sincera' E: 'vere'.

'I am only concerned to see the back of you' E p.14: 'min interesas nur diri al vi adiaŭ' V: 'mi nur volas vidi vian dorson'.

'I am sick with satisfaction' E p.27: 'mi sentas ebrigan kontenton' V: 'mi estas malsana pro kontento'.

'I am ill. I am out of heart' E p.57: 'mi sentas min indiferenta kaj deprimita' V: 'Mi estas malsana. Mi deprimiĝis'.

'He had a low mind' E p.58 'Li havis malinteligantan menson' V: Li havis malican menson'.

Konklude, el la du la kanada tradukistino pli bone komprenis la originalon.

Albert Goodheir

(Antaŭan tradukon de ĉ. 1920, kiun faris Jozefo Seka, mi ne konas)

Pioniroj kaj veteranoj de M.E.M. de Nikola Aleksiev. Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1983. 68p. M.E.M. (Mondpaca Esperantista Movado) estas kompreneble ombrela organizaĵo de komunistaj esperantistoj. Kiel tia, ĝi plenrajte apartenas al la historio de la mondlingvo, malgraŭ tio, ke esperantistoj nekomunistaj ne povas simpatii al ĝia vidpunkto. Aleksiev skizas memoraĵojn pri II pioniroj, kiuj estis anoj de M.E.M. Ili inkluzivas homojn, kiuj havis gravajn meritojn ankaŭ el vidpunkto de la neŭtrala movado: Bokarev, Poliščuk, Gusev, k.a.

Volas korespondi:

Joachim WERDIN, ul. Pionierow 6/A/9, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle, Pollando, 22-jara lernanto havas intereson pri Jogo sed korespondos kun ĉiu.

Horvath György, Szechenyi u. 85, 6400 Kiskunhalas, Hungario, 17-jara gimnaziano en malgranda urbo interesiĝas pri fantazia literaturo kaj komputilprogramado. Kolektas bildkartojn kaj ŝatas vojaĝi.

Franco CAMILLERI, 237 Mdina Road, Qormi, Malta – 13-jara, lernas Esperanton en la lernejo, volas korespondi kun Britaj geknaboj.

Alan Ciantar, Blk 2 Flt 2/A, St. John of Aix, Cospicua, Malta, 12-jara lernas Esperanton en lernejo kaj volas korespondi kun Britaj geknaboj.

Wojciech Milewski, 88-140 Gniewkowo, Skr. poczt. 13, Pollando serĉas korespondamikojn el tuta mondo kaj precipe el Britujo. Interesas lin ĝenerale ĉiuj temoj.

Kucia Czeslaw, ul. H. Sienkiewicza 27m. 7, PL-58-340 GLUSZYCA, Pollando, 30-jara laboristo en karbminejo – malriĉa lernanto de Esperanto volas korespondi kun gebritoj. Interesiĝas pri ĉiuj temoj.

Richard Sampson OPOKU, Twabidi L/A Primary School, P.O. Box 45 HWIDIEM-B/A, Ghana, West Africa petas sendadon de gazetoj, diskoj, kasedoj kaj aliaj materialoj

por helpi lin instrui Esperanton al la geinfanoj en sia lernejo – entute 350.

Internacia koresponda adresaro kaj interŝanĝo de poŝmarkoj tutmonde. Informoj kontraŭ unu I.R.K. ĉe Emil Egner, Třída Míru 19, CS-370-01 Č. Budějovice, Ĉeĥoslovakio.

Ronald Agius, “Xambek” 42 Housing Estate, Siggiewi, Malta, 12-jara knabo kiu lernas Esperanton en la lernejo volas korespondi kun Britaj geknaboj, en Esperanto.

S-ro Rapca Katalin kaj F-ino Pető Mark, Hungaraj gefianĉoj, volas korespondi kun Britoj pri literaturo, klasika kaj moderna muziko, tendumado, ŝi 29-jara instruistino kaj li 26-jara aŭto-elektrika mekanikisto. Adreso: 2092 BUDAKESEZI, BATH-YANYI u. 1/A, Hungario.

S-ro AGOTAI Ede, UFMASZ, Kossuth ut 1/52, H-5052, Hungario 41-jara edzo kun du filoj, ŝatas vojaĝi kaj kolektas bildkartojn kaj landkartojn.

Hojjat NIKRAVESH – palak 10 – kuche Namaty – kh. Hafez 2, Ormia, Azarbaygan garby, IRAN. 14-jara knabo mezlerneĵano volas korespondi.

Aslan Vafadar, 15-jara lerneĵano, volas korespondi. Hang gandermeri-Kh. Daneshkade, Ormia, Azarbaygan garby, IRAN.

MAMOK Krystyna, ul. Zawadzkiego 12/150, 43-100 Tychy, Pollando, 27-jara fraŭlino kolektas bildkartojn, diskojn kaj diversajn Esperantaĵojn kaj volas korespondi kun Britoj.

Akbar Sajadiyan, Mokhtari Cross Vahdat Islams Street, Abazar Alley 37, Tehran 11, IRAN 19-jara lernanto, artisto kun multaj aliaj intereso.

Ketema Nigussie, P.O. Box 33187, Addis Ababa, Etiopio nova lernanto de Esperanto volas havi korespondanton kiu estas studanto de Esperanto.

D-ro Ahmad, Javid, 25-jara dentisto, P.O. Box 81465, 1183 ISFAHAN, IRAN volas korespondi kun Britaj samideanoj – intereso sporto, beletro, naturo kaj muziko.

ORBÁN Livia, 15-jara Hungara lernantino volas korespondi kun anglaj junaĝaj geknaboj, adreso: Celldömölk, Vasvári út 1, H-9500, Hungario.

BODA Emese, 15-jara Hungara lernantino kun geknaboj. Ŝatas legi, sporti, danci, vojaĝi

kaj kolektas pm., bildkartojn. Adreso: Telekgerendas, Dozsa György Ut. 19 5675 Hungario.

Marko Makowski, 15-jara Pola knabo volas korespondi kun geknaboj en Britio. Intereso sporto, muziko kaj modo, kolektas fotojn de famaj sportistoj kaj diskojn. Adreso: Al. Roz 15 m 6, PL-05-500 Piaseczno, Pollando.

Grazyna GAWEDA, ul. Eryka 6/12, PL-71-670 Szczecin, Pollando 35-jara instruistino kaj ĉiĉerono, nova samideano volas korespondi kun ge-Britoj.

ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minimume 20 vortoj. Antaŭpagenda.

NACI-PAC-KONSILANTARO, 29 Great James St., London WC1N 3ES, VOLAS HELPI VIN. Fondita en 1908, NPK estas ombrela organizaĵo por 180 pac-grupoj.

SOUTH PLACE ETHICAL SOCIETY, Red Lion Square, London WC1R 4RL. Lectures and discussions every Sunday 11 a.m. Publishes ETHICAL RECORD.

PRACTICAL ESPERANTO. 20 – 22 September 1985, Knuston Hall, Irchester, Wellesborough, Northants. Tutors: Don Lord, Alan Nutton, Stephen Thomson. This lively course is growing in popularity each year – book early! Further information from the Principal.

Free introductory course: All tutors of the Course should send names and addresses of all students to Anny Lawson, E.A.B. Membership Recruitment Campaign, 22 Fortismere Avenue, LONDON, N10 3BL.

Press Panel: Please send all cuttings on Esperanto or the language problem *immediately* to Kate Millard, 18 Stirling Road, Brislington, BRISTOL, BS4 3PD.

Local Representatives: If you wish to become a Local Representative of EAB, please contact Muriel Shackleton, 3 Northdale Mount, Bradford, West Yorkshire, BD5 9AP.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) celas eduki homojn *per* Esperanto al racia pensado por faciligi rilatojn inter la laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, ROMFORD, Essex, RM6 6EB.